

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, aldono al HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO
senpaga por ĝiaj abonantoj. Adreso: Julio Mangada Rosenörn. — Glorietta
de Bilbao, 5, MADRID

NUM. 1. — JANUARO 1928

AL LA ESPERANTISTARO

Mi aperigas ĉi tiun gazeton por kompleti la laboron de mia Hispana Esperanto-Biblioteko, por esti utila, laŭ eblo, al la ĝenerala esperanta movado, kaj speciale al hispanamerika kaj enlanda, samtempe al nia *Interna Ideo*. Nune popoloj vivas sub influo de reciprokaj suspektoj, timoj kaj grandaj egoismoj, ĉar preskaŭ malaperis vera koncepto pri MORALO ĉe la MONDO, kaj tial ke MORALO estas belega ravanta feliĉiga feino, kiun HOMO devas fervore, lojale, ami, estas entrepreninda la tasko alkonduki kaj alproksimigi al la feliĉiga feino laŭ eblo, ĉar ankaŭ ĉi tio estas sekvi fidele la vojon montritan de la Majstro: «*Amu similulon, kiel vin mem*», «*ne volu por similulo tion, kion vi ne volas por vi*», diras al ni la konscienco; kaj tiel ni devas pensi kaj agi kiel eble plej altgrade, estu kiaj ajn niaj politikaj, religiaj kaj sociaj opinioj, ĉar ĉi tiuj nur estas kvazaŭ diverskoloraj okulvitroj per kiuj kaj tra kiuj HOMOJ vidas la feliĉigan feinon. Ĉi tiu gazeto ne estas *ideisma*, ĝi sekvas la vojon elektitan kaj montritan de la Majstro, tute fidele. Tial per ĝi mi sendas al ĉiuj esperantistoj miajn tutkore fratajn salutojn kaj bondezirojn.

Julio Mangada Rosenörn

LA SKRIBAĴO DE LA MAJSTRO

Majon de 1912, mi, kun staba kapitano Ferdinando Redondo kaj presisto Emilio G. Linera, fondis la gazeton «Homaro», por apliki Esperanton al homamaj idealoj. Je la printempo de 1913, la Majstro proponis al ni aperigi sur nia gazeto sian Politikan kaj Religian Deklaracion («Homaranismon») kaj ni, honorite kaj ĝoje, akceptis la proponon. Sekve ankaŭ, Li eldonis ĉe la sama presejo 5.000 broŝurojn

D^{ro} L. L. Zamenhof
Varsovio, str. Dzika № 9.

San Vincente
20/ene 1913

Kara Lingvano!

Mi ricevis tua flacono
kun lito kaj ankaŭ la lito
subskribita de Vi kun laboro.
Mi ĉi tie en sendas kelan
saluton, kaj en esperas,
ke denove unu el Vi en-
vidos en Berno. La kondi-
cio de la presado kaj sendado
de la broŝuro mi tamen devas
redoni al Vi en Berno.

Vi
J. J. Zamenhof

(«Homaranismon»), kaj ni 3.000 pliajn por helpi la disvastigon de tiu idealo, helpante tiel la celon de la Majstro. Pro tio Li sin turnis al mi per la poŝtkarto aperanta sur la dua paĝo de ĉi tiu numero; kaj, efektive, laŭ espero de la Majstro, mi aliris al Berno, kaj mi estis tre feliĉa konante Lin, paroladante kun Li kaj manpremanante Lin kore kaj frate. Dum aliaj du fojoj mi jam reaperigis la aluditajn broŝuron, kaj republikigis la tekston. kaj mi, fidela je Li, volas estu la dua paĝo de ĉi tiu gazeto LIA SKRIBAĴO.

Julio Mangada Rosenörn

AL LA HISPANA ESPERANTISTARO

Sufiĉe firme iras la vojon antaŭen nia Hispana Esperanto-Asocio, kaj tutplene, post la sukcesinta Kongreso de Madrid, vidigas plej grandan sukceson por nia Kongreso de Sevilla, de la 5.^a ĝis la 9.^a de novembro de 1928; sed estas tute nepre necese forigi de ni la pezan nehelpantan apation, kiu ankoraŭ malpermesis al multaj aliĝi al H. E. A.; konsciu, ke unuiĝo estas forto, ke estas nepre necese starigi firman konstantan interrilatiĝadon: per la unuiĝo de la granda plimulto el la hispanaj esperantistoj, ni havigos al H. E. A. potencon por impresi la publikon, la Instituciojn, la Aŭtoritatulojn, la Registaron; ni havigos al H. E. A. monrimedojn por antaŭenpuŝi nian aferon ĉiel. Per la konstanta, firma, interrilatiĝado, ni starigos reciprokan helpon al la komuna afero, ni kreskigos ĝeneralan entuziasmon, konante partikularajn sukcesojn, ni stimulos unu la alian, ni kreskigos la fervoron kaj fildon ĉies, vidante la progreson de nia laboro. Tial, aliĝu kiel eble plej rapide al H. E. A., sendante al la trezoristo vian kotizon; sendu al ĉi tiu gazeto, konstante, novaĵojn pri la esperanta agado de Grupoj, Asocioj kaj de izolaj esperantistoj, kaj ĉi tiuj penadu por varbi adeptojn, por kio H. E. A. neniam neos al vi helpon.

Paralele ankaŭ iras la vojon antaŭen, kun sama sukceso, la Hispana Esperanto-Instituto, kiu atentas pri la fideleco al la Fundamento, pri unueco de programoj por la gradoj pri kapableco kaj pri kapableco por instruado, kaj kiu jam verkis ĝeneralan programon kaj respondaron por la unua, kaj preparas la samon por la dua; eĉ ĝi eldonos ĉi tiun demandaron kaj respondaron el nur *ses lecionoj* tute en esperanto, por ke ĝi taŭgu kiel kanalo al la instruantoj por instrui la lingvon, liverante ĝin tre malkare. Ĝi jam disdonis al ekzamenitoj oficialajn atestojn, kaj

ĝi estas preta ŝanĝi la malnovajn atestojn per novaj, por ke la oficiala valida atesto estu unu sola, tial ke alproksimiĝas tempo, kiam la atesto valoros, nun men jam valoras, kaj oni postulos ke ĝi estu donita de Oficiala Institucio, kiel jam estas nia Instituto, laŭ decido de nia Kongreso de Madrid, kaj laŭ la Regularo aprobita de la ŝtataj aŭtoritatoj.

Fine, atentu bone, nia Kongreso de Sevilla promesas grandan sukceson, sed ĉi tiu estos despli grava, ju pli vi helpos per via aliĝo kaj per via ĉeesto, kaj vi ĝuos eksterordinare dum kelkaj tagoj; konsciuj ke ĉi tiuj esperanto-manifestacioj vidigas nian forton al neesperantistoj, vekas la atenton de multaj, konvinkas aliajn pri utileco de Esperanto, kaj ĉiel antaŭenpuŝas nian aferon.

Aliĝu al H. E. A., aliĝu al Kongreso de Sevilla, kaj vi vin montros inda je la nomo ESPERANTISTO, ĉar nia afero postulas pli ol platonismon, ĝi postulas unuiĝon, agemon, entuziasmon, fidelecon, reciprokajn subtenon, kunlaboradon, konstantecon, kaj se, kun via kotizo ordinara pro la aliĝo, vi SENDUS UNU PESETON, kiel DONACON por H. E. A., vi ricevus senpage ĉi tiun gazeton ĉiumonate.

ĈE LA TOMBO DE LA MAJSTRO

Al la tombo de la Majstro nin tiris

Amase kortuŝite «NOVA SENTO»;

Alkuris de Popoloj multaj GENTO,

Ĉar pilgrimon koro ĉies sopiris:

En tombejon, do, ni, ĉiuj, eniris

Dolore, jes; sed tamen kun kontento

Staradi antaŭ la tombmonumento

De la Majstro. Pro sentemo ni miris!

Ĉe la tombo, sub la suno plenbrila,

Paroloj aŭdiĝas, kvazaŭ doloro;

Tamen ĵuras, ĉar la forto subtila

De l'Majstra spirito nestas en koro

De fidelular' kuraĝe humila,

Neniam laciĝi, horon post horo,

Al certa triumfo per la laboro

Sindonema, por fratigo utila,

Ĝis kiam fariĝu nia la gloro

—Kvankam eĉ ni juĝu ĝin ne facila—
Havigi al MONDO PACON, kaj koro
Ĉiam plu batadu tute trankvila!

Verkita de Julio Mangada Rosenörn la 11^{an} de aŭgusto de 1927,
sur vagonaro de Varsovio al Danzig.

MEMORAĴO

Ve, amiko kara, malfeliĉa!
Jarojn mi ploradas vian morton!
Por bedaŭri vian malbonsorton
Estas la parolo nesufiĉa!
Bela, esprimanta, la parolo
Mankas al mi por la rememoro
Inda je vi. Ho, ve, mia koro!
Kial malsukcesas mia volo?
Nun ne havas mia fantazio
Verbon ĉu por kant' aŭ sola diro
Pri la kara nia pioniro
De l'Afero en Andaluzio,
Kara, ve, Trinidad Soriano!
Jes; ankoraŭ restas la angoro,
Kiun kaŭzis al mi la doloro,
Ve, pro via mort', samideano!
Eĉ en mia mano tremas plumo;
Mi tre malfacile ĝin subtenas;
Cerb'ideojn vane pensi penas;
Ili tuj disiĝas kvazaŭ fumo.
Celi skribi ilin sur papero,
Ja rezultus esti eĉ ĥimero:
Jen mi tuteplene nekapabla;
La doloro estas malafabla!

Julio Mangada Rosenörn

SONETO
DE
D-RO. CARLOS M. CORTEZO

Mi min ĵetis de l'vivo en batalon
sen la kasko, la ŝildo kaj kiras';
Mi batalis brustnude en forlas'
Rezistente malaman, en min, falon.

Mi malŝatis venĝeman pretan ŝtalon,
Kaj ne gravis spiona perfidpas';
De l'subtila envio min frakas'
Povis vundi, kaj riskis mi ŝakalon.

De senĉesa batalo nun venkite,
Neutilaj kuraĝo kaj obstino,
Mi konfesas nepova min; sed, spite

De l'malvenko, proklamas mi je l'fino,
Dolorita la koro, ke spirite
Min neniam timigis la Destino!

Esperantigis
Julio Mangada Rosenörn

KONSTANTECO
(SONETO)

Kvakam tre rapide la tempo pasis
De feliĉa dat' al ĉi tiu nuna,
Kaj mi jam alvenis al aĝ' aŭtuna;
Ne la temp' kaj aĝo min embarasis.

Malproksime de ŝi, ne min forlasis
Dolĉa rememor' pri l'feino bruna;
De la koro mia - konstante juna -
Senton ne ankoraŭ la temp' frakasis:

Falis sem' de l'amo sur bona grundo,
Ĝi enradikiĝis de l'koro mia,
Forte, fruktodone, en la profundo.

Min tutplene ravis ŝi, tre gracia,
Per talento, ĉarmo kaj eĉ abundo
El kapabloj belaj kun saĝo dia!

J. M. R.

AL MIA LULILO

Mia lulilo estas sankta, ĉar ĝin balancigis la benitaj manoj de mia patrino. Mi vivas ĉiam profunde kore dankema je ĝi.

Ĉe mia memoro mi celas rekonstrui ĝin tute same, kiel ĝi estis, por rememori samtempe tian mian infanetan korpon, kiu ludis kun la patrinaj fingroj kaj kiu nur ridetis aŭ ridis, elmontrante tiel siajn senmakulajn pacon kaj senkulpecon.

Mia lulilo! Ĝia rememoro enpripensigas min en la pasintajn feliĉajn matenojn de mia infaneco kaj en la nigrecon de la nuntempaj noktoj de mia matureco, kiuj estas al mi kvazaŭ morta vualo.

Tiuj estaĵoj, kiuj tiel ameme vartis min kaj atentis endormigi min per siaj patrinaj kantoj, forlasis min por ĉiam, Mi vivas en izolo: sen la bruiĝantaj kaj kunpremantaj ŝmacadoj de mia patrino; sen la konsiloj kaj karesoj de mia patro; sen libereco... Eĉ ne estas al mi deziro por rideti; sed male, multaj aĵoj por plori: mi estas malliberigita!

Ĉi tiu krado, kiu nun apartigas min el la cetero de la homoj estas konstruita el la fero de mia lulilo; ve mia lulilo! La tuta amo; kiu ĉirkaŭis mian lulilon, fariĝis malamo kaŭze de la transformiĝo; sed dum la kradferajoj min retenis, kiel la lulilferajoj subtenis mian infanan korpon, mi ne malamos tiujn spite de la manko de libereco naskanta ĉe la koro de la homoj grandan malamon.

Ĉe la soleco de mia ĉelo, mi kisas la feraĵojn de la krado, serĉante, per miaj lipoj soifantaj je justeco, la lokojn, sur kiujn mia patrino metis siajn manojn, kaj kiujn miaj naivaj larmoj de infano surverŝis.

Hispane verkis Emilio G. Linera

SINTEZAĴO PRI L'IDEALISMO EN LA
ĈIUTAGA VIVO

Ĉe la Universo, ĉe ĉiuj ĝiaj materiaj kaj nemateriaj elmontraĵoj, staras volo, kiu agadas kaj kiun oni nomas multoble: la kreanto, kiu donas formon al la Universo, kiu ĉi tiun senĉese transformas aŭ modifas al perfektigo ankoraŭ ne ekzistanta.

Antaŭ multe da tempo, ĉe la malnova Egiptujo, la adeptoj instruis al siaj disĉiploj ĉi tiujn tri verojn: la animo de la homoj estas senmorta;

la principo donanta la vivon staras ĉe ni mem, estas nepereebla kaj eterne bonfarema; oni ne aŭdas ĝin, nek oni vidas ĝin materie, sed ĝin perceptas tiu, kiu sopiras ĝin percepti; ĉiu homö estas sia propra leĝdonisto, kiu havigas al si mem sian gloron aŭ sian malsukceson, kiu dekretas sian propran vivon. Per ĉi tiuj tri veroj, la homo povas fariĝi arkitekturisto de sia propra destino.

Jinarajadasa

PRI NIA INSTITUTO

Kiam dum la VI^a hispana Kongreso de Esperanto en Madrido prezentis la definitivan Regularon por Hispana Esperanto-Asocio nia samideano Mangada, en kiu ĉi tiu alĝustigis opiniojn de samideanoj de Cordoba kaj de S-ro Gastón (kiu bedaŭrinde mortis malmulte de post la alsendo de siaj opinioj aŭ amendoj) el Zaragozo, S-ro Azorín prezentis pli simplan regularon, kiun unuanime akceptis la Kongreso. Ĉi tiu Regularo deflankigis de si ĉion koncerne la Instituton, por ke ĉi tiu staru aparte kvankam en konstanta rilato kun H. E. A.; tute male esprimis la Regularo aranĝita laŭ la aluditaj opinioj, ĉar ĉi tiu Regularo entenis la Instituton kiel TEKNIKAN FAKON de H. E. A. La Kongreso nur decidis la BAZOJN por organizi la Instituton, kaj kiam oni ekstarigis ĝin la Ĝenerala Direktoro de Polico, laŭ la leĝo, ne akceptis la BAZOJN, informante ke oni nepre devus alifor migi ilin laŭ statutoj eĉ starigi kotizon; kaj tial oni aliformigis la BAZOJN, STATUTOJN, nur kun la aldono pri kotizo. Nu; la Kongreso ĉiompova, voĉdonante, decidis, kaj por plenumi la decidon kaj la Leĝon estis necese prezenti la jenan Regularon:

CELO DE LA INSTITUTO

Artikolo I. Kvankam aŭtonomia rilate al Hispana Esperanto Asocio, Instituto havas intiman rilaton kun ĝi, informante kaj projektante pri teknikaj aferoj koncerne la lingvon Esperanto, kaj pri ĝia instruado; ĝi starigos Centran H. E. A. n Bibliotekon.

KONSISTO

Art.^o II. Ĝi konsistas el KVARDEK Membroj maksimume.

Art.^o III. Estos Membroj de la Instituto:

I. La Membroj kaj eksmembroj Lingvo-Komitatanoj, kondiĉe ke ili estu hispanoj; kaj estas elekteblaj la jenaj:

II. La posedantoj de Profesora Diplomo;

III. La verkintoj de esperantaj lernolibroj aŭ literaturaĵoj, kiujn oni konsideris meritindaj.

IV. Ĉiuj posedantaj nediskuteblan kaj firman aŭtoritatecon ĉe la hispana esperantismo.

Ĉiokaze estas nepra kondiĉo esti hispano kaj membro de Hispana Esperanto Asocio.

DIREKTANTA KOMITATO

Art.º IV. Ĝi konsistas el Prezidanto, Vicprezidanto, Sekretario, Vicsekretario kaj Kasisto, kies duono devas esti elektita ĉiudujare, en konstanta rilato kun la Direktanta Komitato de Hispana Esperanto Asocio.

ENKASITAĴO

Art.º V. La enkasitaĵo de la Instituto konsistas el la jarkotizoj de de ĝiaj Membroj (ĉiu Membro po unu peseto jare); el la monsumoj al ĝi donacitaj de Hispana Esperanto-Asocio; el la takso starigota por la disdonado de Kapablecaj Diplomoj, k. t. p.

Art.º VI. Okaze de disfalo de la Instituto, ĉiuj ĝiaj monsumoj aŭ posedaĵoj fariĝos apartenaĵoj de la Hispana Esperanto Asocio.


EJO

Art.º VII. La ejo de la Instituto estas tiu de Hispana Esperanto Asocio, nuntempe Sagasta, 10, Madrid, Ejo de la Hispana Ruĝa Kruco.

Aprobita de la Ĝenerala Direktoro de Polico la 17.^{an} de Septembro de 1926.

Kaj oni faris ĉion tion ĉi laŭ la aktoj kaj dokumentoj de la Kongreso, kormforme je la postuloj de la Leĝo, ne laŭ kaprica opinio ies. Sekve, en ordo laŭleĝe, kaj laŭ voĉdono de la Kongreso, oni fari liston el personoj por starigi la membraron, laŭ la III^a Regulo, enlistigante la jenajn:

S-roj: Vicente Inglada Ors, Akademiano, Madrid; Antonio López Villanueva, Lingvokomitatano, Murcia; Mariano Mojado Abad, Lingvokomitatano, Madrid; Félix Díaz, Lingvokomitatano, Bilbao; Julio Mangada, Lingvokomitatano, Madrid; José Perogordo, Eks lingvokomitatano, Madrid; Víctor O. de Allende, Bibao; Fernando Redondo, Canarias; Fernando Soler Valls, Valencia; José Anglada Prior, Barcelona; Rómulo S. Rocamora, Barcelona; Francisco Azorín, Córdoba;



Urbodomo (Sevilla).

Teodoro Elizondo, Bilbao; Eduardo J. de Castro, Gijón; Andrés Piñó Alegret, Valencia; José Núñez Rey, Barcelona; Amalia Núñez Dubús, Pamplona; Manuel Maynar Barnolas, Zaragoza; Emilio Amor Rolán, Orense; José Artigas, Huesca; Manuel Caplliure, Valencia; Carlos M.^a Cortezo, Madrid; Vicente Alonso Sanz, Madrid; Luis Rodríguez Escartín, Madrid; Serafín Baudín, Málaga; Gabriel Alomar, Palma de Mallorca; Benigno de Luna, Madrid; Luis Campos Suay, Melilla; Rodrigo Almada, Badajoz; Carlos Martínez, Sevilla; Julio Belenguer Nuez, Teruel; Nicolás de Pablos, Badajoz.

El kiuj bedaŭrinde ĵus mortis S-ro Julio Belenguer Nuez, sperta malnova kaj laborema samideano (li ripozu pace apud la Majstro).


Tuj mi min turnis letere al ĉiuj sciigante al ili la aferon kaj aprobon de la Regularo, kaj oni tuj elektis la jenan Komitaton:

Prez. Pastro Mariano Mojado, Madrid; Vicpr. S-ro Antonio López Villanueva, Murcia; Sekr. S-ro Julio Mangada, Madrid; Vicsekr. S-ro Luis Rodríguez Escartín, Madrid; Trezor. Vicente Alonso, Madrid.

Estas konstatinde, ke S-ro Vicente Inglada, persone unue ĉe la sidejo de la Instituto kaj de H. E. A., kaj per letero al mi, kiu estas ĉe la arĥivo de la Instituto, senkulpigis sin por ne akcepti la prezidantecon aŭ ian ajn postenon, ĉar ordonoj de la Milita Ministerio malpermesis al li tiajn postenojn; alimaniere li estus la Prezidanto de la Instituto, eĉ laŭ propra rajto pro sia Akademieco, kaj oni ne povas dubi pri ĉi tio, ĉar oni scias bone, ke la laboro de S-ro Mangada, helpante S-ron Rollet de L'Isle, atingis de la Registaro, ke ĉi tiu estu sendinta S-ron Inglada al la Pariza Konferenco por enkonduko de Esperanto en la Sciencoj, kaj poste, per agado ankaŭ de S-ro Mangada, al la Universala Kongreso de Ĝenevo, por fari prelegon ĉe la Somera Universitato, ĉiam konsciente la nediskutindan kapablecon de nia glora kaj tutmondfama samideano.

La Instituto funkcias bone, ĝi disdonis jam 92 diplomojn pri elementa kapableco, kaj 8 pri supera kapableco por instruado. Ĝi ŝanĝos la malnovajn atestojn per novaj senpage por unuigi la titolojn, sed kun la nova resendos ankaŭ la malnovajn, kiujn interesatoj povas konservi kiel memoraĵon: sendu, do, al mi la dokumentojn por la ŝanĝo, kaj sciui ke la nova diplomo estas belega.

Mariano Mojado



Detalo de la Urbodomo (Sevilla).

KRONIKO

La movado en nia lando vigligas: en Gijón jam oni starigis grupon, kaj tute same ĵus okazis en Oviedo, kie nia samideano S-ro Antonio Giménez, Infanteria Kapitano, entuziasme agadas; kaj ni povas konstati, ke en la Norda Kantabra Hispanujo formigadas potenca samideano: Baracaldo-Bilbao-Santander-Oviedo-Gijón, vidigante al ni, por baldaŭa dato, ĉe Oviedo, gravan nacia Kongreson, ĉar nia movado postulas atenton al Norda kaj Nordokcidenta Hispanujo, vekante la entuziasmon de malnovaj iam fervoraj samideanoj de Lugo-Orense Coruña-Santiago-Vigo.

Ĵus en Madrido, D-ro. Karolo de San Antonio faris sukcese gravan paroladon pri Esperanto kaj Medicino ĉe la Kolegio de Kuracistoj, kaj sekve li malfermis kurson; S-ro Benigno Luna, kiu spite de sia maljuneco laboradas, okaze de la Festo de la Libro, faris paroladon ĉe l'«Fomento de l'Artoj», grava instruejo, kie li malfermis kurson; S-ro Mangada (Julio), okaze de la fermo de la somera kurso en la «Ateneo», plej grava kultura Asocio de Madrido, okazigis ĉe ĝia ĉefa salonego praktikan demonstracion pri Esperanto; mallonga parolado tre impresiga, per kiu li prezentis la lingvon kun ĉiuj ĝiaj grandaj sciencaj, pedagogiaj, eĉ homamaj, valoroj; dekunujara knabeto deklamis la poemon de S-ro Cart «Ho Don Kihoto!», tradukante ĝin; lernantino recitis la tradukon de belega tre popolura versaĵo, «Rimoj» de la fama hispana poeto Becquer, kaj, fine, la gelernantoj kantis popolajn kantojn, akompanate plane de alia lernantino. Ĉi tiuj gelernantoj, kaptite de la zamenhafa celo, kun S-ro Mangada Rosenörn, formis la Grupon «Antaŭen kuraĝe», el limigata membraro ambaŭseksa, por intensi propagandi la lingvon, okazigante elprovojn samajn je tiu de la Ateneo. Ĉi tie disvolvigadas la esperanta kurso, kiun klarigas S-ro Mangada Rosenörn por kvindek gelernantoj.

En Barcelono niaj kunlaborantoj S-roj Anglada Prior kaj Rocamora vigle laboras; la unua klarigante kurson en lernejo, la dua verkante propagandajn artikolojn, kiuj aperas sur la gravega ĵurnalo *Las Noticias*.

En Jerez S-roj Fiol kaj Naranjo laboras por revivigi la antaŭan gravan movadon de ĉi tiu urbo.

Bonvolu komuniki al ĉi tiu gazeto ĉion pri esperanta laboro.

NOVAĴOJ LAŬ INTERNACIA ESPERANTO-SERVO

Kiu okupas sin pri Esperanto? — Okaze de l'40-jara jubileo de Esperanto estas interese scii, kiu okupas sin pri Esperanto. Inter la 1.000 partoprenintoj el 36 landoj en la 19^a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis antaŭ ne longe en Danzig, troviĝis inter alie: 5 politikistoj, 58 scienculoj, 110 profesoroj, instruistoj kaj pedagogoj, cento da ŝtatoficistoj, inter kiuj oficistoj de P T T kaj de l'fervojo, 23 advokatoj kaj notarioj, 33 kuracistoj, 14 pastroj, 22 redaktoroj kaj ĵurnalistoj, 64 homercistoj, industriuloj, bankieroj ktp. ktp. kaj pli ol 150 studentoj kaj lernantoj.

Unu sola traduka lingvo en la internaciaj kongresoj. — En la 4^a Kongreso por la nova Edukado, kiu okazis en Locarno en la monato septembro, la malhelpo de l'lingvoj kaj la neceseco de internacia helpa lingvo estis treege sentebla. Estas decidite utiligi Esperanton kiel solan lingvon por tradukado en la proksima kongreso en Kopenhago kaj organizi grupon por diskutado en Esperanto. Pluraj partoprenintoj devigis sin reciproke, studi Esperanton por paroli aŭ almenaŭ kompreni ĝin.

La sama decido estas farita por la Universala Kongreso de Religioj, kiu okazos en Hago la 1 aŭgusto 1928, la Internacia Kongreso de la Pacifista Junularo, okazonta la 16 aŭgusto 1928 en Ommer kaj la Internacia Kongreso de l'Kristan-Socialistoj, la 1 septembro 1928 en Le Locle.

La Internacia Kongreso de l'Abstinantaj Fervojistoj, kiu estis aranĝita de 30 junio ĝis 2 julio en Stockholm, unuanime adoptis rezolucion favore al Esperanto. Okaze de l'6^a Kongreso de la Laborista Sport-Internaciano en Helsingfors (Finlando) la ministro de Eksteraj Aferoj salutis la kongresanojn de div. nacioj en finlanda lingvo *kaj en Esperanto*, internacia helpa lingvo de l'kongreso.

Prokrastitaj telegramoj en Esperanto. — Kiel sekvon de la allaso tutmonda de Esperanto kiel lingvo klara, la P T T-administracio de Danzig (IV. H./26. 7. 27.) decidis permesi la uzadon de Esperanto por la «prokrastitaj telegramoj». La nombro de lingvoj permesitaj estas tre limigita. Tiuj telegramoj (sole allasitaj por transmar-landoj) devas porti la indikon L. C. O.

La Poŝto kaj Esperanto. — Okaze de la 40^a jubileo de Esperanto la poŝto de U. S. S. R. eldonis artan poŝtmarkon kun la bildo de Dro. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto. La oficialaj kovertoj por «leteroj fermi-

taj» ankaŭ portas, de post kelka tempo, la oficialan enskribon en Esperanto.

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ DE L'SAAR-TERITORIO

La Registara Komisiono de l'Saar-Teritorio, Sekcio de Kultoj kaj de l'Publika Instruado publikigis la sekvantan dekreton (J. Nro. 11 990/27. 18. 7. 27.):

«Ni konsentas, ke Esperanto estu enkondukata kiel fakultativa instrua fako en la superajn kaj mezajn lernejojn. Kie troviĝas instruistoj, kapablaj instrui Esperanton tie la enkonduko povas okazi jam nun. la nuna instrua jaro. Rekomendinda estas dumjara kurso enhavanta du lecionojn posamejne en iu meza klaso, ekzemple en la malsupra dua klaso (10^a instrua jaro). Kurso por instruistoj pli malfrue estas intencata. subskr.: Dro. Colling.

Al sinjoroj. Direktoroj de l'Superaj Lernejoj. Rektoroj de la Mezlernejoj. Prezidantoj de la lernejaj reprezentantaroj.

Esperanto en Radio.—En sia kunsido de l'29 septembro 1927 en Como la Konsilantaro de la Internacia Unio de Radiofonio adoptis unuanime novan rezolucion favore al Esperanto, el kiu ni citas la ĉefan eron:

«Konsiderante, ke Esperanto estas potenca helpilo por la interkompreniĝo kaj la alproksimiĝo de l'nacioj, la Konsilantaro invitas denove la membrojn de la Unio dediĉi plej grandan atenton al tiu ĉi lingvo kaj antaŭ ĉio konservi ĝian instruadon en siaj programoj. Memorigante la rezolucion de la Ĝenerala Kunsido de l'12 majo en Lausanne, la Konsilantaro rekomendas al la membroj, turni sin al la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado en Ĝenevo—en kontakto kun la sekretario de la Internacia Unio de Radiofonio—kiu metis sin al la dispono de l'stacioj por indiki al ili la lokajn kunlaborantojn-esperantistojn kaj kiu estas preta ankaŭ publikigi internacian horaron de l'disaŭdigoj en Esperanto por faciligi la sukceson de la entrepreno.

HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO

celas eldoni jare dekdu kajerojn, ĉiu el ili 32 paĝa almenaŭ, ĉiam kun la sama formato 13½ × 19½ cm., pri literaturo, historio, legendoj, arto, k. c., de Hispanujo, kvankam iufoje aperigos rimarkindajn frem-

dajn tekstojn, kun ilustritaĵoj foje, sur luksa papero, por havigi al la Esperantistaŭ interesajn legotaĵojn.

Abono por la serio estas OK pesetoj KVINDEK centimoj, por ĉiuj landoj, kaj abonanto rajtas ricevi senpage ĉi tiun gazeton, kaj ĵus aboninte la Bibliotekon, li ricevos NAŬ kajerojn, el ili: «AVILA» kun 30 bildoj; «FERDINANDO VI kaj FARINELLI», novelo verse kaj proze verkita; «EL MODERNA HISPANA PARNASO» kun belegaj bildoj; «PRI HISPANUJO KAJ ĜIAJ POPOLKANTOJ», kun muzikaĵoj de Murcia; «DU JUNAJ FRAŬLINOJ» kaj «KORNELIINO», du noveloj de la aŭtoro de «DON KIĤOTO»; «DON KIĤOTO» (unuan kajeron de la tutmondfama verko de Cervantes), k. c. Ĉi tiun lastan kajeron nur havigos aparte S-ro Ludoviko Torrent (Presejo. Strato Válgame Dios, 6-Madrid), al kiu povas sin turni por mendoj interesatoj. S-ro Torrent faros rabaton, 10%, kiam mendo minimume atingos 50 specimenojn; por mendo el 250, 500 kaj 1.000 specimenoj, la respektivaj rabatoj estas 20%, 30% kaj 40%. Ĉiam estas postulata antaŭpago.

Speciale la Grupoj kaj Asocioj devas aboni la Hispana Esperanto-Biblioteko'n, ĉar neniu alia libraro kune kun tre interesa kaj bela gazeto estas pli malkara, ol la Hispana, kiu samtempe estas tre fidinda, ĉar abonanto, tuj de post la abono, ricevos naŭ librojn, kaj ĉiumonate kun granda akurateco ĉi tiun gazeton.

PRESEJO

LUDOVIKO TORRENT KAJ KIO

VÁLGAME DIOS, 6

MADRID-HISPANUJO